

Bulgara ESPERANTISTO





La nova E-diplomitoj en Burgas kun sia gvidanto Kunĉo Valev (vd. paĝon 5)



Inaŭguro de la nova E-klubejo en Gălăbovo: k-do Krăstiu Karucin, sekretario de BEA, tranĉas la rubandon (vd. paĝon 3)

El la tendarlernejo apud Druĵevo: la grupo el Haskovo kun la E-instruistino Maria Veleva (vd. paĝon 4)



ENHAVO

** Jaro de fruktoĉona laboro	I
** Oktobraj kunvenoj de la bulgaraj esperantistoj	2
** Telegramo: al la soveta popolo, al la soveta esperantistaro	3
Goĉo Kozv. Granda E-solenaĵo en Gălăbovo	3
Nikola Mladenov. Bone sukcesis la Esperanta tendarlernejo apud Druĵevo	4
** Nova E-kursoj	5
** Honorita instruisto de Esperanto	5
** La novaj diplomitoj de Esperanto	5
Ivan Vojnov. Varma somero	6
Nadia Andrianova. Baltmara E-Tendaro — 18	6
** Pri la sekcio „Veterano“	6
Radu Ratrašku. Konciza novaĵoj pri la E-movado en Rumanio	6
** La E-movado en Irano	7
** Grésillon esperantista 25 jaro n	7
** Esperanto en televido	7
Emilija Nandrova. Internacia E-laborbrigado en Hungario	8
** Universitata prelego pri Esperanto	8
** Esperantista edziĝfesto en Pila	8
** Inflacio de tradukistoj	8
Anĉo Anĉev. Stanu Stoianov Vasilev	9
Lingva laboratorio. Respondo al proponoj en n-ro 5	10
** „Sciencaj Komunikadoj“	10
Mihail Ĉobanov. Kie estas Avo Frosto?	11
R. Wiener. Amo, aŭtuno kaj grafologoj	12
Nevena Nedelĉeva. La koro de la poeto	13
D-ro Vaz Velho. Unu dimanĉo en „Maria Maĉado“	14
Vanja Filipova. Knabineto kaj maljuna kverko	15
** Distroj: humuraĵoj, vizitkartoĵoj	16
Numa Drozd. Packanto	III
** Deziras korespondi. Nekrologo pri D. I. Conkovska	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Inaŭguro de la nova klubejo de E-Societo „Kolombo de la Paco“ en u. Gălăbovo, distrikto de Stara Zagora

Redakta komitato:

Kunĉo VALEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin Bărev, Luba BOJAĜIEVA, Hristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstiu KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.

Korektis: Rajna Konstantinova
Sofio, poŝt. esto 66 Tel. 31-00-29



JARO DE FRUKTODONA LABORO

En paco kaj krea agado pasis la jaro 1977. En la analoj de nia Movado ĝi restos kiel jaro de fruktodona laboro de ni ĉiuj. En la kadroj de nia asocio ĝi estos memorata per du eventoj: la 90-jara jubileo de Esperanto kaj la 70-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio. Oni festis la jubileojn diversmaniere - ĉu per solena kunveno kun belarta programo, ĉu per militingo, ĉu per regiona renkontigo de esperantistoj, ĉu per ekskurso al vizitindaj lokoj ktp.

Multo estas farita sur la kampo de la instruado. Aperis nova ilustrita E-lernolibro, eldonita de Ŝtata Eldonejo «Narodna Prosveta» en 15 000 ekz. Krom centoj da kursoj por komencantoj funkciis la Internaciaj E-kursoj en la pitoreska Pisanica apud Smoljan (de la 1 de junio ĝis la 30 de oktobro), E-kursoj en la propra ripozdomo de Bulgara Esperantista Kooperativo apud v. Druŝevo en la Balkano, aŭtuna feriado en Velingrad. Por profunde studi la lingvon kaj la metcdikon de la E-instruado 200 personoj partoprenis en Meden Rudnik apud Burgas la Internaciajn Kursojn por Instruistoj de Esperanto. Sukcese funkciis ankaŭ la tutlanda koresponda kurso. Dufoje en la jaro komence de januaro kaj aprilo — okazis unusemajnaj E-kursoj por ĉiuj. En kvin regionoj de la lando pedagogoj konferencis kun la celo vigligi kaj pli bone organizi la instrulaboron de Esperanto. Dankon pri tiuj atingoj meritas la distriktaj estraroj de BEA en Smoljan, Sofio, Burgas, Pazarĝik ka.

Sukcese marŝis la kulturkleriga agado. La Centra Estraro dissendis al ĉiuj societoj plurajn referaĵojn, inter kiuj ankaŭ pri la 60-jara datreveno de la Granda Oktobra Revolucio — la epokfaranta evento en la homa historio.

En marto 1978 nia popolo celebros solene la 100-jaran datrevenon de la liberigo de Bulgario fare de la rusa popolo el sub la 500-jara otomana jugo. CE de BEA dissendis cirkuleron pri tiu ĉi glora jubileo. Necesas, ke la distriktaj kaj societaj estraroj konkretigu ĝin laŭ la lokaj kondiĉoj, kiel ekzemple procedis la DE en Pleven.

Bona estis la aktiveco de BEA ankaŭ sur la internacia kampo. Trimembra delegitaro partoprenis la konsultigon de la E-asocioj el la socialismaj landoj en Karl-Marx-Stadt. Reprezentantoj de BEA vizitis kongresojn kaj konferencojn de frataj esperantistaj asocioj, kie ili rakontis pri nia por- kaj per-esperanta laboro. Bulgara kongresanoj, vizitintaj Rejkjavikon kaj Puatieron, disdonis informajn materialojn pri nia lando kaj la kongresurboj Varna kaj Veliko Târnovo, alvokis al amasa partopreno en la kongresoj. Funkciuloj de la junulara sekcio partoprenis E-simpoziojn en Hungario kaj Pollando. Bulgaraj MEM-agantoj prezentis sin antaŭ la forumoj en Moskvo kaj Varsovio. BEA aliĝis al la protestkampanjo kontraŭ produktado de neŭtronaj bomboj kaj aliaj amasmortigiloj.



La organiza stato, kiel antaŭ nelonge konstatis la Buroo de la Centra Estraro, estas kontentiga. La distriktaj estraroj kaj la plimulto de la societaj estraroj agas laŭplane, altiras novajn membrojn, kolektas membrokotizojn, abonojn al «Bulgara Esperantisto», «Paco» kaj «Scienca Mondo». Tamen en kelkdekoj da societoj mankas aktiveco. Tasko de la koncernaj distriktaj estraroj estas fari la necesajn klopodojn por ties revigligo.

Multe da atento estas dediĉita al la preparlaboroj por la 63-a UK en Varna kaj la 34-a Kongreso de TEJO en Veliko Târnovo. Por ilia plena sukceso estas necesaj la penadoj ne nur de LKK, sed de ĉiuj distriktaj estraroj, kiuj organizos antaŭ- kaj postkongresajn aranĝojn. Sed ankaŭ tio ne sufiĉas: estas necesa la aktiveco de ĉiu esperantisto, ja ĉiu havas amikojn en alilando, kiuj dezirus veturi al Varna kaj Târnovo. Ju pli da kongresanoj, des pli da sukcesaj kongresoj! Tradicie la amikoj de bulgaraj esperantistoj post la kongreso vizitas ties loĝlokojn kaj renkontiĝas kun la lokaj esperantistoj. Tiel estis post la 48-a kongreso en Sofio, la 19-a kongreso de TEJO en Vraca, la jubilea 20-a kongreso de IFEF en Varna.

Do la nova jaro submetos nin al gravega ekzameno. Ni faros tiun ekzamenon plensukcese, se ni ne ŝparos fortojn kaj aktivecojn ne nur por reteni la ĝisnunajn atingojn, sed impone pliigi ilin, kiel decas al la Bulgara Esperantista Asocio.

[OKTOBRAJ KUNVENOJ DE LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ]

La 60-a jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio estis solene celebrita de la esperantistoj en la tuta lando. Jen informo pri kelkaj celebroy.

Sofio. En la salono de la Kulturdomo de Komercaj Laboristoj okazis amasa tuturba kunveno, en kiu pri la 60-a jubileo de Oktobro parolis Hristo Gorov — la prezidanto de BEA. La kunveno akceptis telegramon al la sovetaj popolo kaj la sovetaj e-stoj. Estis plenumita altnivela belarta programo, kiun partoprenis armeana vokala kvaropo, la konataj kantistoj-e-stoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov. Recitis Mišo Zdravev, Mariana Elenova, Jorĵeta Zdraveva.

Târgoviște. Laŭ iniciato de la Distrikta Packomitato, DK de Bulgara-Soveta Amikeco, DE de BEA, Distrikta Junulara Domo kaj popola legejo „Napredak“ okazis granda kunvevo, kiun ĉeestis e-stoj el Norda Bulgario kaj el la urbo, ankaŭ neesperantista publiko. Oratoro estis Nikola Aleksiev — prezidanto de MEM. Li parolis pri la mondhistoria signifo de la Granda Oktobro kaj rakontis pri la laboro de la e-stoj-pachatalantoj. La kunveno akceptis rezolucion pri la sankta bulgara-soveta amikeco kaj kontraŭ la produktado de neŭtrona bombo fare de Usono. La kantaĵaro „Rodna Pesen“

kaj la infana balettrupo ĉe la legejo prezentis belegan belartan programon.

Stara Zagora. DE de BEA kaj la kvar E-societoj en la urbo organizis grandan solenaĵon dediĉe al la 60-a jubileo de Oktobro. Raporton faris Elena Zločevska. Sub la gvido de la operartistino Rene Jordanova estis plenumita riĉa programo el Esperantaj kaj rusaj kantoj kaj recitaĵoj.

Jambol. Dediĉe al la Oktobra Jubileo E-Societo „M. Gorkij“ organizis ekskurson al montodomo „Zdravec“, kie okazis kunveno. Raporton pri la Oktobra Revolucio kaj pri la aktivaj ligoj de la sovetaj kaj bulgaraj e-stoj en la pasinteco kaj nun faris Dimo Trudoljubov. En la belarta programo Penka Papazova legis siajn versaĵojn, Galja Georgieva recitis el Penju Penev, Mitoska Stojanova plenumis estradajn kantojn.

Kazanlâk. En solena kunveno, organizita de E-societo „Roza Valo“, pri la granda signifo de Oktobro parolis Ivan Noev. En la belarta programo recitis Hristo Kurumilev, Svoboda Damjanova, Doĉka Dolapĉieva.

Feliĉan Novjaron! La redakcio bondeziras al siaj multnombraj legantoj en kaj ekster la lando sanon kaj grandajn sukcesojn en la nobla E-laboro!



Ni, la sofiaj esperantistoj, partoprenantaj la ĉefurban solenan kunvenon dediĉe al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, sendas plej sincerajn, varmajn salutojn al la frata soveta popolo, al la sovetaj esperantistoj kaj ilia potenca patrolando — la unua en la mondo ŝtato de la venkinta proletaro. La Oktobra Revolucio metis la komencon de nova erao en la historio de la homaro. Ĝi fermis la malhelan paĝon de la malnova mondo — mondo de socia ekspluatado, senrajteco kaj malriĉeco, kaj malfermis la paĝon de nova, ĝoja mondo de libero kaj socia justeco, — la mondo de socialismo kaj komunismo. Sovetunio per siaj grandiozaj sukcesoj en la socialisma konstruado, per la admirindaj atingoj de siaj scienco kaj tekniko, per la senprofita helpo, kiun ĝi donas al la laboruloj en la tuta mondo en iliaj bataloj por liberigo el kapitalisma kaj faŝisma tiraneco kaj ekspluatado, per sia malavara helpo al la koloniaj kaj aliaj subpremitaj popoloj en ilia batalo por libero kaj nacia sendependeco, per sia konsekvenca Lenina politiko de amikeco, kunlaboro kaj paco inter ĉiuj popoloj fariĝis ekzemplo kaj espero por ĉiuj demokratiaj kaj honeste pensantaj homoj sur la tero. Tial la flago de la Granda Oktobro flirtas en pli kaj pli da novaj landoj kaj aŭguras la baldaŭan venkon de la socialismo en la tuta mondo.

La bulgara popolo, ricevinta duafoje sian liberon de la popoloj de Rusujo, de Sovetunio, nun konstruas novan, feliĉan vivon en sia patrujo sub la suno de vivokrea, frata amikeco kaj kunlaboro kun ili kaj per ilia neprofitema helpo. Por ni tiu amikeco estas sankta, nerompebla, kaj neniu tera forto povas ĝin mortigi.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, subtenas plej viglajn aferrilatojn kun la sovetaj esperantistoj. Pere de la internacia lingvo Esperanto ni donas valoran kontribuon en la granda batalo por komprenigo kaj kunlaboro inter ĉiuj popoloj sur la tero, por paco en la mondo. Ni aldonas nian voĉon al la voĉo de la tuta pacamanta homaro, deklarante firme:

— «Ne» al la planoj kaj la provoj de la mondaj reakciuloj bruligi novan, ĉi-foje plej teruran, eksterman militon! «Ne» al la vetarmado! „Ne» al la preparo de novaj armiloj por amasa mortigado de homoj!

Vivu la paco, la amikeco kaj la kunlaboro inter la popoloj de la tuta terglobo!

Vivu kaj floradu la vivokrea bulgara-soveta amikeco kaj la ĉiam pli plena kaj ĉiufanka kunlaboro inter la bulgara popolo kaj la popoloj de la granda Sovetunio!

Vivu kaj venkadu tra la jarcentoj la granda afero de la Granda Oktobro!

DE LA SOLENA KUNVENO

GRANDA E-SOLENAJO EN GĂLĂBOVO

Neforgesebla restos la tago 23 de oktobro 1977 por la membroj de E-societo „Kolombo de la Paco“ kaj la tuta loĝantaro de u. Gălăbovo, distrikto de Stara Zagora. En tiu tago dediĉe al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Revolucio estis solene inaŭguritaj ekspozicio „Esperanto serve al paco kaj progreso“ kaj la nova klubejo de la societo.

E-flagoj flirtis ĉie en la urbo — super stratoj kaj placoj, ĉe la fervoja kaj aŭta stacioj. Jam en frua mateno junaj e-stoj kun

verdaj flagetoj enmane deĵoris ĉe la stacioj kaj en la klubejo. Venis multege da gastoj el Stara Zagora, Sofia, Plovdiv, Gorna Orjahovica, Vraca, Blagoevgrad, Nova Zagora, Ĉirpan, Kotel, Marica, Kazanlâk, Măgliŝ, Sipka, Enina, Dălboki ka. Amasiĝis salutleteroj. La konstanta ekspoziciejo estis plenplena de homoj. Oficialaj gastoj: Tenĉo Kolev — sekretario de la Urba Komitato de BKP, Kr. Karucin — sekretario de BEA, Rajno Ĉipilev — prezidanto de

DK de BEA en Stara Zagora, Fitkov — el DK de BKP, Angel Mitev — sekretario de UK de Komsomolo, Dinjo Balikov — ĉefredaktoro de ĵ. „Gálábovska Iskra“ ka. La ekspozicion malfermis per solena parolado k-do Tenĉo Kolev. La gastoj admiris la senprofitan laboron de la junaj e-stoj de Gálábovo, kiuj pere de E-to kolektis abundan materialon el la tuta mondo kaj aranĝis 38 impresajn E-tabulojn.

Poste la ĉeestantoj direktiĝis al la centro de la urbo, kie ili metis florkronon antaŭ la monumenton de la pereintoj en la Patrolanda Milito kontraŭ la faŝismo (1944—45 j.). Sekvis malfermo de la nova E-klubejo, kiun la entuziasmaj e-stoj de Gálábovo mem konstruis. K-do Karucin tranĉis la rubandon

kaj ĵetverŝis akvon al la enirejo, por ke neniam ĉesu la homtorento al la klubejo.

En restoracio „La blankaj kolomboj“ okazis komuna tagmanĝo. Estis donitaj premioj al tiuj, kiuj plej aktive partoprenis la konstrulaboron por la klubejo. Sekvis salutparoloj de gastoj kaj belarta programo, kiun partoprenis la operartistino Rene Jordanova el St. Zagora, Ĥr. Kurumilev el v. Sipka, Boris Kestov el Gálábovo, Bojĉo Mladenov el Vraca. Posttagmeze la gastoj vizitis la termoelektran centralon „Marica Iztok—3“. Iuj havis la plezuron surgrimpi ĝian 325-metran fumtubon — unu el la plej altaj en Eŭropo. La centralo estas ido de la bulgara-soveta amikeco.

Goĉo Kozv

BONE SUKCESIS LA ESPERANTA TENDARLERNEJO APUD DRUJEVO

Ĉi-jare la Esperanta tendar-lernejo apud v. Drujevo en la Balkano atingis tre bonajn sukcesojn.

Sinsekve trapasis ĝin 6 grupoj, ĉiu el kiuj restis du semajnojn.

La unua (10—25 de junio) venis el Ĥaskovo — 21 lernantoj el la I kaj III klasoj, plus unu el v. Drujevo. Lektoro — la instruistino Marija Veleva. La kurso finiĝis per ekzamenoj.

La dua grupo (25. VI. — 8. VII.) estis el Velingrad, 20 infanoj el V kaj VI klasoj, kaj unu el Drujevo. Lektoro — Petranka Trendafilova el Velingrad.

La tria grupo (12—25 de julio) 21 infanoj el Mágliĵ kaj 3 el v. Drujevo. Lektorino — Svoboda Damjanova el Kazanlák.

La kvara grupo (26. VII. — 8. VIII.) konsistis nur el plenaĝuloj — 15 personoj precipe el Sofio. Lektoro — d-ro Stojan Moraresku.

La kvina grupo (10—23 de julio) — 15 personoj, miksitaj, precipe el lernantoj plus kelkaj plenaĝuloj. Lektoro — d-ro Moraresku.

La sesa grupo (25. VIII. — 7. IX) — 11 personoj, precipe plenaĝuloj. Lektoro — Dimitro Borisov el Sofio. En ĝi partoprenis ankaŭ la mongola esperartisto Asálbaj, kiu faris prelegon pri sia patrolando. Estis aranĝita renkontiĝo kun la honora prezidanto de Bulgara E-Kooperativo kaj fondinto de la tendar-lernejo Evstati Cifudov.

Ĉe la instruado en ĉiuj grupoj oni tre sukcese uzis la novan lernolibron por infanoj kaj multajn pervidajn rimedojn. Aparte notinda estas la flanelografo uzita de k-dino Petranka Trendafilova. Oni multe konversaciis, kantis, recitis. Je la fino de ĉiu grupo estis solena vespera fajro, kiun vizitis ankaŭ junuloj el Drujevo. Aparte kontribuis por la variigo kaj pliriĉigo de la tendara vivo s-ano Prodan Prodanov — kantisto, verkisto, pentristo.

Preskaŭ ĉiuvespere okazis liaj koncertoj. Ĉiuj ĝuis ne nur liajn kantojn, sed ankaŭ liajn pentraĵojn. Ĉirkaŭ Prodanov ĉiam estis amaseto da homoj, kiuj ravite observis la pentroproceson. Liaj pentraĵoj, prezentantaj momentojn el la tendara vivo, interesajn anguletojn el la vilaĝo kaj el la ĉirkaŭaĵo, pendis en la manĝejo, kvazaŭ tio estus eta ekspozicio.

Alia interesa samideano, pli longe restinta en la tendaro, estis Anani Anev — aktoro. Oni iom malfrue eksciis, ke ankaŭ li estas pentristo. Anev interese rakontadis pri diversaj renkontiĝoj kaj travivaĵoj, kiujn li havis en siaj vojaĝoj al E-kongresoj enlande kaj eksterlande.

Al la tendaranoj gastis nur mallonge ankaŭ s-ino Belka Beleva — konata E-aktoro, kaj s-ano Simeon M. Simeonov — elstara E-poeto. Beleva rakontis pri UK de Esperanto en Islando, Simeonov kaptis ĉiujn per sia poezio kaj esperantista vervo.

Ĉio ĉi plus la ĉarma naturo kreis bonegan, agrablan atmosferon en la tendar-lernejo. Mi firme kredas, ke ĝi fariĝos ĉiam pli kaj pli alloga por la esperantistoj — junaj kaj plenaĝaj, ĉar tie ili povas trankvile perfektigi en la lingvo kaj samtempe ripozi kaj amuziĝi. BEK, kiu zorgas pri la materiala flanko, havas planon decide plibonigi la kondiĉojn en la bazo kaj starigi ankoraŭ unu konstruaĵon. La Sofia Distrikta Estraro de BEA, kiu organizas la kurson kaj aparte prizorgas la metodikan laboron, devas sufiĉe frue anonci la kondiĉojn por la venonta jaro kaj obstini ĉe la varbado de partoprenantoj dum la tuta somero. Ni diru ankoraŭ: kun perspektivo baldaŭ transformi ĝin en reputacian konstantan tutjaran E-ripozejon kaj lernejon.

Nikola Mladenov



Pazargik. En la pupteatro—por aktoroj kaj lernantoj. Kursgvidanto Blago Blagov.

Polski Trâmbeš. Miksita E-kurso por komencantoj — gejunuloj, inĝenieroj, instruistoj, sociagantoj ka. Gvidanto Hristo Manolov. Ĉe la solena malfermo — salutoj de Donka Veličkova, prezidantino de la Urba Konsilantaro de Kulturo, kiu ankaŭ estas kursanino.

Jambol. La nova lernoĵaro komenciĝis per solena kunveno, kiun malfermis la prezidanto de DE de BEA Georgi Jordanov. Ĉeestis malnovaj e-stoj kaj la komencantoj. Paroladon pri la rolo de la internacia lingvo Esperanto faris Dimo Trudoljubov — prezidanto de E-societo „M. Ĝorkij“.

Ekfunkciis du E-kursoj — por civitanoj kaj por lernantoj.

Bjala. Kvar E-kursoj sub la gvido de Simeon Baltagiev funkcias en jena entreprenoj: „Peĉatni platki“ — 15 persono, „Modul“ — 12, „P. Volov“ — 10, en la urba pre-sejo — 8.

Preslav. Per solena kunveno en salono de la Urba Popola Soveto komenciĝis la nova lernoaro de E-to. Pri la rolo de E-to hodiaŭ parolis la prezidanto de E-societo „Ora Epoko“ d-ro Georgi Popov. La kursgvidantino Rajna Stanĉeva instruis la unuan lecionon. Ekfunkciis du kursoj — por civitanoj kaj por lernantoj.

HONORITAJ INSTRUISTOJ DE ESPERANTO

Konekse kun la regularo pri honorititoloj de instruistoj de Esperanto (publikigita en n-ro 7—8 de „BE“) la Burgo de CE de BEA honoris siajn E-instruistojn:

ELSTARAJ LEKTOROJ

- | | |
|---|-------------------------|
| 1. Asen Grigorov — Sofio | 3. Georgi Dimov — Varna |
| 2. Atanas Danĉev Atanasov — ADA — Sofio | 4. Ivan Sarafov — Sofio |

REKONITAJ LEKTOROJ

- | | |
|---|-----------------------------|
| 1. Bejko Markov — Levski (nun en Varna) | 5. Petro Pambov — Smoljan |
| 2. Canko Murgin — Ŝumen | 6. Radoslav Triĉkov — Vraca |
| 3. Kunĉo Vâlev — Sofio | 7. Simeon Hesapĉiev — Sofio |
| 4. Miĥail Elenov — Ĥaskovo (nun en Sofio) | 8. Violin Oĵjanov — Sofio |

LA NOVAJ DIPLOMITOJ DE ESPERANTO

Ĉi-jare en la someraj 20-tagaj Internaciaj Kursoj por Instruistoj de Esperanto en Burgas diplomiĝis pri instruarĵto de Esperanto la jenaj gesamideanoj:

- | | |
|---|--|
| 1. Nikolaj Atanasov Uzunov el Ĥaskovo | 15. Elena Konstantinova Kalinkova — Varna |
| 2. Penka Vasileva Miĥajlova — Kazanlâk | 16. Lazar Nikolov Andreev — Varna |
| 3. Anton Borisov Ivanov — Stara Zagora | 17. Bojan Georgiev Nikolov — v. Ĵilenci, Kjustendil-distr. |
| 4. Liljana Andreeva Vâlĉeva — Varna | 18. Marija Todoŝeva Georgieva — Varna |
| 5. Blagovesta Ivanova Uzunova — Ĥaskovo | 19. Petrana Borisova Ikonomova — Asenovgrad |
| 6. Georgi Nikolov Dolapĉiev — Sofio | 20. Halil Ahmedov Halilov — v. Timarevo, Ŝumen-distr. |
| 7. Marija Borisova Labova — Kjustendil | 21. Stefka Georgieva Obretenova — Pleven |
| 8. Ivanka Kireva Kokalinska — Kjustendi | 22. Vasilka Penĉeva Kovĉazlieva — v. Debel, Burgas-distr. |
| 9. Ivanka Miteva Popova — Stara Zagora | 23. Zlatka Delĉeva Todorova — Ĥaskovo |
| 10. Djanko Spasov Minĉev — Gĉbrovo | 24. Jerzy Posluszny — Vroclav, Pollando |
| 11. Ljubomir Dojĉev Dimitrov — Gĉbrovo | 25. Tadeo Sobieraj — Koszalin, Pollando |
| 12. Mariana Miĥajlova Elenova — Sofio | 26. Ludvik Chytil — Přerov, Ĉeĥoslovakio |
| 13. Kanju Mitev Kanev — Gâlâbovo | |
| 14. Pavlina Ĝjurova Karâkova — Ĉerven Brjag | |

Ni gratulas kaj bondeziras fruktodonan laboron sur la instrukampo de Esperanto

La somero ĉiam donas eblecon al la esperantistoj kontroli kaj plialtigi sian lingvan nivelon renkontiĝante kun siaj malnovaj gekonatoj el diversaj landoj aŭ trovante novajn geamikojn.

Ne ellasis la konvenan momenton ankaŭ la junaj esperantistoj de Sofio. Kelkaj partoprenis en la Internacia E-Brigado en Turkeve, Hungario. Aliaj plibonigis sian lingvan nivelon en kursoj de Esperanto en la ĉeĥoslovaka urbeto Poprad aŭ en nia nigra mara urbo Burgas. Por la turistoj celobjektoj estis montaraj vojaĝplanoj tra Rumanio, Pollando, Ĉeĥoslovakio aŭ turistaj objektoj en GDR kaj Hungario. Eble plej multe da emocioj travivis la partoprenantoj en la 33-a Kongreso de TEJO en Francio.

Ĉiuj ĉi manifestiĝoj de membroj de la Sofia Junulara E-Societo estis preparpaŝoj por la 34-a Kongreso de TEJO en Veliko Târnovo en 1978.

Ivan Vojnov

TRA LA E★ MONDO

BALTMARA E-TENDARO — 18

La 18-a Baltmara E-Tendaro, dediĉita al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobro kaj la 90-a datreveno de Esperanto, okazis ĉi-jare dum la lasta semajno de aŭgusto en la pitoreska urbo Rezekne—Latvio. Ĝin partoprenis 226 e-stoj el 12 sovetaĵaj respublikoj. La programo de la tendaro estis varia kaj altnivela. Ĝi enhavis someran universitaton, seminariojn — pedagogian kaj pri junularaferoj, fakkunvenojn, liberan tribunon, interesajn ekskursojn kaj amatorajn koncertojn. Funkciis 3 E-kursoj por komen-cantoj kaj progresintoj, eĉ kurseto por infanoj. El 14 prelegoj, prezentitaj en SU, 10 estis dediĉitaj al la E-movado kaj la problemoj de interlingvistiko. La plej interesaj kaj riĉenhavaj estis: la prelegoj de k-do Podkaminer el Leningrado („La Oktobra Revolucio kaj la E-movado“ kaj „La E-movado post la morto de Zamenhof“); la ampleksa prelego de k-do Jan Ojalo el Talin („De Babelo ĝis Talin“).

La tendaro pasis tre sukcese kaj frukto-done. Kronis ĝin gaja adiaŭa bankedo, en kiu la plej aktivaj partoprenintoj estis premiitaj per diversaj memordonacoj.

BET — 19 okazos en 1978 en Estonio.

N. Andrianova

Ĉe BEA en 1973 estis fondita sekcio „Veteranoj“ kun estraro: d-ro Boris Nedkov, Stojan Kostadinov kaj Krâstju Karucin. Samtempe la sekcio membras en la Internacia Veterana Esperantista Klubo, kies organo estas „INFORMILO“, eldonata de la Esperanto-Muzeo en Vieno. Ano de sekcio „Veteranoj“ povas esti ĉiu esperantisto el nia lando, kiu lernis E-ton antaŭ pli ol 40 jaroj kaj scipovas paroli ĝin. La membroj de la sekcio ne pagas membrokotizon.

La distriktaj estraroj de BEA devas fari la necesan, por ke ĉiu esperantisto, havanta la kvalitojn de veterano, estu organizita en la sekcio. Tiucele ĉiu kandidato por veterano sendu per la koncerna distrikta estraro al la Centra Estraro de BEA sian biografion kaj portreton (el la lastaj jaroj). La biografioj devas esti sufiĉe detalaj rilate al la esperantista agado de la veterano, ĉar ili estos fontoj por verkado de la historio de la bulgara E-movado.

Lige kun la 70-jariĝo de BEA la Centra Estraro skribis al la distriktaj estraroj prepari kaj sendi nomarojn pri tiuj veteranoj, kiuj ĝis nun ne estas honoritaj per la ora insigno de BEA.

Bedaŭrinde ne ĉiuj respondis. Tial la estraro de la sekcio „Veteranoj“ petas ĉiujn distriktajn estrarojn indiki en la nomaro, ĉu la kandidato por veterano jam posedas aŭ ne la honoran insignon.

KONCIZAJ NOVAĴOJ PRI LA E-MOVADO EN RUMANIO

Kvankam ankoraŭ neoficialigita, la E-movado en Rumanio disvolviĝas kontentige, se oni farus komparon kun la situacio de antaŭ kelkaj jaroj.

El la agado dum la lasta tempo oni povas citi jenon:

1. Funkciis kursoj en la urboj Bukureŝto, Braŝov, Kluĵ-Napoka, Timiŝoara. La kurso en Timiŝoara kaj unu el la bukureŝtaj kursoj funkciis en la lokaj universitatoj.

2. En revuo „Napoka Universitară“ aperas E-kurso de Adrian Krengăliș.

3. La e-stoj en Kluĵ-Napoka estigis sekcion de E-biblioteko ĉe la granda urba biblioteko.

4. La 28-an de aŭgusto en Braŝov okazis simpozio je temo „Lingvo kaj kulturaj rilatoj“. Pri diversaj objektoj parolis ses kompetentuloj. La simpozion ĉeestis 50 e-stoj el Bukureŝto, Braŝovka. Ĝi estis gvidata de C. Apriotesei, universitata lekcisto el Timiŝoara.

5. En la konferenco de E-medicinistoj, okazinta en julio ĉi-jare en Krakovo (Pollando), el Rumanio partoprenis d-ro Konstantin Kornesku, kiu ricevis specialan diplomon



pri sia parolado. Prelegon sendis al la konferenco ankaŭ s-ano d-ro Gabor Lazar el Kovasna.

6. Ĉi-jare en la jubilea Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en Zagrebo partoprenis du rumanaj pupteatroj: el Kluĵ-Napoka, gvidata de Julia Sigmond, kaj el Bakau, gvidata de prof. Aurel Boia.

7. En septembro j. k. la Bukureŝta Radiostacio disaŭdigis intervjuon kun la universitata lekciistino Ioana Apriotesei pri la E-kurso, okazinta ĉi-jare en la Bukureŝta Universitato.

LA E-MOVADO EN IRANO

Kvankam la E-movado en Irano estas tute nova, ĝi tamen estas tre grava, dank' al la iniciatemo kaj aktiveco de d-ro Saheb-Zamani, profesoro en la Universitato de Teherano. Tie, en la kadro de la kulturaj aktivecoj, funkcias nuntempe 9 kursoj, nedevigaj kaj senpagaj. En ĉiuj kursoj partoprenas proksimume 160 personoj de 10 ĝis 70-jaraj.

Krome, d-ro Saheb-Zamani estas unu el la ekspertoj de la Organizaĵo de Tutmonda Sano en la branĉo pri psikologio kaj, estante fama verkisto, li estas tre estimata de la popolo. Pro tio la radio, la televido kaj la gazetaro estas favoraj al Esperanto.

Antaŭ nelonge aperis du tutpaĝaj artikoloj en sinsekvaj numeroj de la plej grava kaj populara gazeto „Rastahis“. Ĝi estas verkita de iu lernanto, juna ĵurnalisto, kaj pritraktas la verkon de prof. Ĝ. Waringhien pri Kajam kaj la kondiĉojn, en kiuj li majstre tradukis tiujn 150 versojn. Kajam estis ne nur grava matematikisto kaj astronomo, sed ankaŭ la plej fama poeto de post la 11-a jarcento.

Prof. Waringhien kun sia esploro, teknika zorgo, scienca atento kaj konscia laboro tradukis ĝin el la farsi-lingvo. Antaŭe li korektis la tradukon de la „Nobla Korano“. Tiuj du tradukoj, pli bonaj ol kiu ajn en aliaj lingvoj, havis gravan influon por altiri la simpatiojn de la homoj kaj allogi ilin al la E-kursoj.

Pro tio la iranaj e-stoj estas dankemaj al prof. Waringhien kaj ĉiel klopodas antaŭenpuŝi la novnaskitan movadon. Tial por plulerni Esperanton du iranaj samideaninoj venis al Eŭropo. La unua, s-anino Saghalian, komence vojaĝis al pluraj landoj, kaj kiel la dua, s-anino Saheb-Zamani, perfektigis en Parizo ĉe s-anino Haudebine. Ili ambaŭ partoprenis diversajn aranĝojn por akiri spertojn pri la E-movado. Post sia reveno el UK en Rejkjavik ili kapablos instrui kaj disvastigi Esperanton en sia lando.

Laŭ „Franca Esperantisto“,
n-ro 305/1977

En julio 1952 malfermis siajn pordojn la Esperantista Kulturdomo „Grésillon“ kaj tiel Anri Mikar (Henri Micard) realigis sian revon. Ĉu revo? Laŭ vidpunkto de tiamaj samtempuloj, jes! Sed krom nevenkebla idealismo la kreanto posedis ĉiujn kvalitojn de praktika, serioza kaj klera homo. Al li grupo de bonvolemaj esperantistoj konfidis la aferon.

La vivo de „Grésillon“ ne ĉiam estis tre glata: sendube la plej akra momento estis en 1965 pro grava malsano de s-ro Mikar, kiu devigis lin kaj lian edzinon forlasi la karan „kreaĵon“.

Ekde tiam la geedzoj Baben (Babin) kuraĝe transprenis la gvidadon ne sen timo. Tamen jam en la suplemento al „Kulturaĵoj“ novembro-decembro 1965 s-ro Baben povis skribi: „Du faktoj permesas al mi fidi optimisme je la estonteco de la domo: ĝi nun kontentige adoleskis kaj geamikoj estas pretaj kunlabori.“

Fakte sezono post sezono miloj da vizitantoj partoprenis la kulturajn aranĝojn en „Grésillon“ kaj en kion diris unu el la partoprenantoj: „Mi certe jam aŭdis pri la Esperantista Kulturdomo, sed mi neniam antaŭvidis tiel interesoplenajn tagojn: la belega kadro, la afableco de la deĵorantoj, la programo, ĉio ravis min kaj same la plimulton de la partoprenantoj, kaj mi certe revenos.“

Esperanto en televido

● La aŭstria televido okazigis dissendon (31. 10. 77), kiu enhavis koncizajn eldirojn pri Esperanto de kelkaj elstaraj e-stoj, kantojn en E-o, filmofragmenton ka. Estis montritaj libroj kaj aliaj materialoj el la Internacia E-Muzeo en Vieno. Centran lokon en la dissendo okupis d-ro Hube, direktoro de la muzeo.

● En Brazilo en la tutlanda televida programo, kiun kutime rigardas ĉ. 30 milionoj da homoj, la konata e-sta geedza paro Grattapalia (Grattapaglia) intervjuigis (12. 7. 77) dum 7 minutoj pri E-o kaj la komunumo „Bona Espero“ (Brazilo), kie ili vivas.

● En FR Germanio la Bavara Televido elsendis (22. 8. 77) 5-minutan raporton pri E-o.

● En Usono la televidstacio de Filadelfio dissendis duonhoran intervjuon kaj lecionon de E-o; la dissendon aranĝis ges-roj Tonkin.

Laŭ „Informilo“ de Internacia E-Muzeo en Vieno, n-ro 4/1977

La brigado estis 25-taga kaj okazis en urbo Turkeve de la 10 de julio ĝis la 3 de aŭgusto. Partoprenis 64 esperantistoj el 5 landoj, inter kiuj 31 el Bulgario (15 virinoj plus 16 viroj), 24 el Pollando (16 virinoj plus 8 viroj), 6 el Hungario, 2 el Jugoslavio kaj 1 el Danlando. Plej multaj estis studentoj — 26, lernantoj — 11, diversoficaj 25 kaj 2 pensiuloj.

La brigadanoj fosis kanalojn. La laborado daŭris de la 7 ĝis la 14 h., poste — libera tempo.

Okazis E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj, gvidataj de s-ano Jozefo Pava.

La programo ekster la labortempo estis tre varia: liberaj promenadoj, banado, sunbruniĝo ka., vizito al urba muzeo kun konstanta dulingva (en hungara kaj Esperanto) ekspozicio, vizito en la plej granda aŭtoriparejo en la lando, pola vespero (lige kun la pola nacia festo), hungara popola dancprezentado (kun instruado de „ĉardaŝ“), 2 popolmu-

zikaj vesperoj, 2 koncertoj de muzikgrupoj, 3 baloj, 4 diskovesperoj, ekspozicio de E-libroj, eldonitaj en Hungario, 2 ekskursoj al rivereto, 2 tuttagaj ekskursoj al urboj Solnok kaj Gjula.

Ĉe la fermo de la brigado oni donis al ĉiu brigadano diplomon pri partopreno, specialan ĉemizon, keramikajon. 31 personoj ricevis ankaŭ premion el hungaraj gramofondiskoj kaj E-libroj.

Post la brigado — 4-taga ekskurso, dum kiu ni vizitis u. Eger.

La brigado plene sukcesis. La farita laboro estis sufiĉa, tial ĉiuj estis kontentaj: kaj la organizantoj, kaj la patronoj (La Urba Soveto de Turkeve, la Komunista Junulara Asocio, la Pionira Asocio, la urba kulturdomo kaj la Teritoria Komitato de Hungara E-Asocio). Kontentaj estis ankaŭ la brigadanoj, ĉar ili ekhavis multajn novajn geamikojn kaj bone perfektigis en la lingvo.

Emilija Nandrova

Universitata prelego pri Esperanto

Unuafoje en la historio de GDR universitato akceptis en sian oficialan instruadon serion de lekcionoj pri „planlingvoj“. Prelegos d-ro Detlev Blanke, kiu doktoriĝis pasintjare surbaze de E-disertacio. Ekde 1. 9. 1977 d-ro Blanke fariĝis instruanto en la Humboldt-Universitato en Berlin (GDR).

En la centro de liaj pritraktoj troviĝas Esperanto (fontoj, strukturo, evoluo, komunikadaj potencoj, movado, objekto de lingvoscienco). La lekcionoj estas devigaj.

Esperantista edziĝfestoj en Pila

En j. «Illustrowany Kurier Polski», kiu ofte publikigas materialojn pri la E-movado, aperis (29. 6. 77 j.) informo pri interesa evento. Ni prezentas ĝin koncize.

La esperantistoj en la vojvodua urbo Pila (Pila) — Pollando, organizis neoforgeseblan feston okaze de la geedziĝo de magistrino Kristina Hibner — multjara aktiva prezidantino de la loka E-societo «Ago», kaj la bulgara esperantisto Petko Kazakov el u. Gabrovo. La juna paro ricevis donace belegan gobelidon kun ornamanto el edziĝringoj kaj verda stelo.

(Sekvas informoj pri la novaj edziĝkutimoj en u. Gabrovo.)

Inflacio de tradukistoj

En 1958 la oficejo de la Eŭropa Komunaro — (EK) havis 11 interpretistojn, en 1976 jam 2740. Ĉiu tria oficisto en tiu organizaĵo produktas kaj disdividas tradukojn en la 6 oficialajn lingvojn. Ne pli ol la duono de la salajrularo en Bruselo konsistas el interpretistoj kaj tradukistoj. Tio ne povas ŝanĝiĝi, ĉar ĉiu lando insistas pri samrajteco de sia lingvo, kaj la franca pretendo apliki la francan por forigi la malfacilaĵojn estas obstine rifuzata de la britoj, same kiel de la danoj.

Junaj esperantistoj, skribu al viaj samaguloj!

La sekcio de Bulgara E-Junularo en Ruse atendas leterojn de rumanoj geamikoj. Skribu al adreso: 7002 Ruse, str. 9 Septemvri '98. Esperanto-Societo „Libro“, Bulgario.

Bulgarij junuloj, skribu amase al la B-kureŝta Junulara Sekcio, ing. Jozefo Nogi, bul. Ĥristo Botev 6. 70 035 Bukureŝto, sektoro 3, Rumanio.

Ne sufiĉas nur aliĝi al la internaciaj E-kongresoj en Varna kaj Veliko Târnovo. Estas necese ankaŭ prepari sin bone por povi plenvalore kontakti kun la eksterlandaj kongresanoj. Tial aliĝu tuj al supera lernoformo! Perfektigu plue viajn lingvokonajn!



STANJU STOJANOV VASILEV

Se li estus viva, nun li havus 65 jarojn. Sed la faŝismo frue forprenis lian valoran vivon.

Stanju estis la kvara el la ses infanoj de Rada kaj Stojan Vasilev el v. Kirilovo, distrikto de Vraca. La patro pereis sur la bataalkampo de la Unua Mondmilito. Al la malriĉeco de la familio aldoniĝis ankaŭ la orfeco.

Stanju finis fundamentan lernejon en la najbara vilaĝo Batulci. La bona diploma tamen alportis ĝojon al neni en la malriĉa familio: tute mankis monrimedoj, por ke la kapabla knabo daŭrigu la studadon. Stanju komencis labori sur la kampo, kolektis ovojn por la komercistoj, fosis putojn. Li ofte ŝanĝis siajn metiojn, tamen lia amo al la scienco restis ĉiam neŝanĝita. Li multe legis. La soifo pri scioj kondukis lin al la popola legejo en la vilaĝo, al la abstinula societo, al la marksistaj rondetoj.

Kune kun siaj fratoj Vasil kaj Stojan li komencis lerni ankaŭ Esperanton kaj baldaŭ bone posedis ĝin. La reakciuloj en la vilaĝa komunumo mirigite rigardis la nekompreneblan skribaĵon kaj diradis: „La filoj de Rada estas danĝeraj homoj!“ Lia patrino mem ofte ŝercis: „Dio mia, miaj filoj malmulte studis, sed mi komprenas nek iliajn leterojn, nek iliajn parolojn!“

En la kazerno okaze de la 1-a de Majo — la Internacia Festo de l'Laboro, soldatoj-komunistoj disĵetis skribajn alvokojn. Stanju estis inter ili. La caraj oficiroj ne sukcesis malkaŝi la disĵetintojn. En la kazerno Stanju diligente lernis la militarton, certa, ke ĝi estos necesa en la estontaj bataloj kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo.

Post la militservo Stanju eklaboris kiel ĉarpentisto en Sofio. Li partopre-



nis strikojn kaj protestajn demonstraĵojn. De tiu tempo al li restis signo de policana sabro sur la kapo. Poste Stanju fariĝis tramisto. La tramistoj elektis lin konsilanto en la ĉefurba komunumo. Tie liaj paroladoj multfoje incitis la urbestron, kaj tiu ofte forprenis al li la parolon.

Kiam la hitleristoj invadis Sovetunio, Stanju ricevis la taskon organizi partian laborejon por eksterleĝaj dokumentoj. La dokumentoj, faritaj de lia grupo, eltenis ne unu polican kontrolon, ne unu blokadon.

En 1942 j. Stanju Vasilev estis devigita ekvivi eksterleĝe. Li fariĝis membro de partia batalgrupo, ricevis la taskon likvidi la aĉan agenton-provokanton Nikola Hristov Kotuza. Stanju propramane mortpafis lin. Post tio li fariĝis komandanto de kvin batalgrupoj, kiuj plenumis kelke da sukcesaj sabotoperacioj kaj neniigis provizaĵojn destinitajn por la germana hitlerana armeo.

Je la 8 de junio 1943 Stanju iris al strato „Kiril kaj Metodij“ por renkontiĝi kun sia frato Stojan — studento, ankaŭ partoprenanto en batalgrupo. Perfidulo denunciis la fratojn al la polico. Komenciĝis interpafado. Stojan estis arestita, sed Stanju sukcesis eskapi. La polico blokis la tutan kvartalon kaj komencis kontrolon en ĉiuj loĝejoj. Denove perfidulo montris, kie kaŝis sin la „dangera konspiranto“. Al la propono kapitulaci

Stanju respondis per kugloj. Kelkaj policianoj kaj agentoj pereis, sed la fortoj estis malegalaj. Per la lasta kuglo la nobla homo oferis sian junan kaj maltrankvilan vivon sur la altaro de la popola libero.

Nun la ĉefurba tramejo portas lian nomon. Stanju Vasilev restos eterne inter la naciaj herooj de la bulgara popolo, fiero por la bulgara esperantista movado.

Ančo Anĉev

Lingva 'laboratorio

En n-roj 5, 6, 7—8 de „BE“ estis donitaj kelkaj tipaj bulgaraj esprimoj kaj vortoj aŭ tiaj, kiu mankas en niaj E-vortaroj. Estis direktita peto al la legantoj proponi trafa'n tradukojn. Kelkaj s-anoj am faris tion skribe — ni dankas ilin!

La redakcio kunvokis grupon de sperta' e-stoj (Atanas D. Atanasov, prof. d-ro Sto'an Ĝuĝev, Asen Grigorov, Ljubomir Miĥailov, Violin Olanov, Dimitro Haĝlev, Flori Nikolov, Simeon M. Simeonov, Kunčo Vălev), kiuj atente pridiskutis la donitajn vortojn en n-ro 5 kaj rekomendas jena'n tradukojn:

отчетен доклад — **agadraporto, priagada raporto, raporto pri (la) agado**

отчитам се (за разходи) — **prezenti (doni) konton**

отчитам (грешката си) — **rekoni, konfesi, konscii (eraron)**

отчитам се (към организация с чл. внос) — **kotizi**

отчетен член — **kotizinta membro**

район (част от град) — **urbodistrikto**

оспорвана борба — **egalforta, necedema, streĉa batalo, batalo kun alternaj sukcesoj**

спортна дисциплина — **sportspeco; sporta disciplino (obeo al sportaj reguloj)**

санитарен възел — **sanitara nodo (arkitektura termino)**

закрит басейн — **kovrita, enhala baseno**

разузнавач (военен) — **skolto; spiono**

схващам се — **rigidiĝi, stupori**

комплекс:

жилищен — **loĝkomplekso**

санитарен — **sanitara komplekso**

туристически — **turista komplekso**

черноморски — **nigramara restadejo, ripozejo, feriejo**

четирилистна детелина — **kvarfoliera trifolio**

Nomo'n de nacia' manĝaĵoj estas preferinde lasi en ties nacia formo aldonante E-fina' jon. Ordinare estas necesa ankaŭ klarigo — ĉu en krampo, ĉu en piednoto. Tiel:

кебапче — **kebapĉo** (bulgara manĝaĵo — kolbasetforma kradrostaĵo el muelita viando)

кюфте — **kjuŝteo** (bulg. manĝaĵo — rond-

forma plata kradrostaĵo aŭ friŝaĵo el muelita viando).

„SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ“

Estas jam la tria kajero de la rapide populariĝintaj „Sciencaj Komunikaĵoj“ (SK)*, kiu la interesiganta pri sciencoj leganto tenas en la manoj. La unua kajero, SK-75, havis nur 48 paĝojn, la dua (SK-76) jam 72, kaj jena kajero, SK-77, estas 100-paĝa. La progreso estas evidenta, almenaŭ kvante, sed ankaŭ pri la kvalito ni minimume povas diri, ke ĝi ne estas malpli alta ol tiu de kiu ajn faka

aŭ scienca revueto en nia Esperantujo. La kajeroj de la Sciencaj Komunikaĵoj pli kaj pli prezentas la tutan spektron de la sciencoj. Aperis artikoloj en preskaŭ ĉiu ĉefa scienca branĉo kaj tiel la kultivantoj de unu branĉo, aĉetante la kajerojn, samtempe „subvencias“ la publikeblecojn por la aliaj branĉoj.

La ĉi-jaran aperon de SK apogis ne nur la

* Aliono al „Budapeŝta Informilo“, 1977 j.



Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA, sed ankaŭ la centro de HEA mem. Ili meritas sinceran dankon.

.....

Karaj enlandaj kaj eksterlandaj fakuloj-kolegoj! Bonvolu kontribui al nia malfacila laboro laŭ viaj kapabloj! Partoprenu en la redaktado, verku klarajn, bonstilajn artikolojn pri viaj fakoj, aĉetu nian (vian!) eldonaĵon! Ni faros nian plejebelon, sed ni ege bezonas vian helpon. Helpu, ke nia sciencas serio vivu!

El la ĉefartikolo de la redukcio de SK

POEZIO kaj BELETRO

Mihail Ĉobanov

KIE ESTAS AVO FROSTO?

Kiom da ĝojaj momentoj mi travivis kun la infanoj en novjaraj festotagoj! La infanoj tiel kredas al la bona maljunulo kaj tiel admiras lin, ke ili pretas promesi ĉion ajn, kion li igus ilin fari enmanigante la novjaran donacon. Kiel brilas la infanaj okuloj, kiam ili venas al li por montri, ke ili lernis parkere versaĵon aŭ jam scias novan kanteton! Kaj ĉiu el ili volas stari pli proksime al Avo Frostost* dum la novjara danceto.

Sed ne nur la infanoj! Ankaŭ ni, plenaĝuloj, emociiĝas aŭskultante liajn bondezirojn direktitajn al ni: „Estu sanaj, vivu en ĝojo kaj paco por atingi grandajn sukcesojn en la laboro kaj en la vivo! Estu feliĉaj!“ Tiujn bondezirojn ni ĉiam direktas unu al alia, sed se ilin prononcas la buŝo de Avo Frostost, ornamita per neĝeblanka vato, tiam ili kvazaŭ havas decidan forton kaj ravan potencon. En tiu momento ni akceptas la vortojn de Avo Frostost kiel esprimon de niaj plej bonaj pensoj kaj deziroj. Ni, ni, la plenaĝuloj, kredas! Kaj kion diri pri la infanoj?

Mi neniam forgesos okazon restintan por ĉiam freŝa en mia memoro.

* En diversaj landoj diversmaniere nomata, ekz. en Francio „père Noël“, en Anglio — „Santa Claus“ ktp.

El la enhavo de Sciencaj Komunikadoj:

Dr. Kalocsay Kálmár D. Sc.: Pri la vortosistemo de Esperanto.

Dr. Oblatt Gábor: La suno kaj la biosfero
Leivategija Leida: Pri la Planto-protektado
Dr. (i o) Gal Ilo a C. Sc.: Nia vivo kaj la mikroboj.
Dr. (ino) Bikszadi Ilona: Malsanoj de novnaskito.
Pclovits Ida: Pri la farmacihistorio en Hungario.
Carevskij L. P.: Histopatologio de pulmoj ĉe mikropa alergio
Dr. (ino) Gajzago Istvanne: La kario de la dento.
Dr. ing. Haszpra Otto D. Sc.: Elemento de la Inĝeniera deformologio.
Dr. ing. Haszpra Otto D. Sc.: Elementoj de la inĝeniera Statiko. Elementoj de la inĝeniera Hidraŭliko.

Kiam mi aŭdas la vortojn „Avo Frostost“, kie ajn mi estus, mi ĉiam travivas tiun ĉi okazon kun nemalfortiĝanta emocio.

Estis novjara solenaĵo en domo por sengepatraj infanoj.

Finiĝis la brua tumulto, la kantoj kaj recitadoj de la geknaboj, de Neĝulino kaj la sep gnomoj, finiĝis ankaŭ la danco de la bonaj bestoj, kaj Avo Frostost disdonis la donacojn kun bondeziroj. Poste li adiaŭis la infanojn kaj la instruistojn kaj eniris la ĉambron de la direktoro.

Pasis iom da tempo kaj la pordo de la ĉambro malfermiĝis. Eliris viro ĉirkaŭ 55-jara, kun iom ruĝiĝinta vizaĝo kaj stranga brilo en la okuloj. Ambaŭflanke de la pordo staris du knabetoj ĉirkaŭ sep — okjaraj, enmane kun la donacoj de Avo Frostost. Kliniĝinte ili volis vidi iun en la ĉambro, sed la pordo tuj fermiĝis, kaj la infanoj ekstraris antaŭ la elirinto.

— Kio okazis, infanoj? Kiun vi serĉas? — demandis la viro.

— Ĉu ne tien ĉi eniris Avo Frostost? Ĉu li ankoraŭ estas en la ĉambro?

Nun mi ne scias, kion ĝuste celis tiam la viro. . . Eble li intencis konservi ĉe la infanoj la ideon pri la ĉiopoveco de Avo Frostost, tial li diris:

— Kiam mi eniris la ĉambron, Avo Frosto jam estis malaperinta, kaj mi ne scias, kien li iris! Vi ja scias, kiom multe da infanoj li devas viziti!

— Kiel ni ne povis vidi lin eliranta! Nun denove ni devas atendi tutan jaron. Ni devas diri al li ion ege gravan!

La infanoj havis tiel ĉagrenan aspekton, ke la homo kompatis ilin.

— Kion vi volis diri al li? Eble mi hodiaŭ vidos lin kaj mi transdonos al li vian deziron. Tiel vi ne atendos tutan jaron.

Tiuj vortoj ŝajne vekis ian esperon en la koroj de la infanoj. Ili rigardis unu la alian kaj per okuloj interkonsentis, kiu el ili parolu. Unu ekparolis tenante la manon de la alia. La vortoj estis tre mallaŭtaj, por ke aŭdu ilin neniuj krom la viro:

— Avo Frosto ĉion scias. Li scias, kie troviĝas ĉiu infano, kiel ĝi lernas kaj kondutas — ĉion!

— Jes, Avo Frosto ĉion scias! — jesis la viro.

— Kamarado oĉjo! — diris la sama infano, kvazaŭ „oĉjo“ estis treege necesa vorto, por ke la viro eksentu la grandan respondecon, kiun li devos akcepti. — Avo Frosto ĉion scias! Li scias ankaŭ, kie troviĝas niaj patri-

noj! Kio okazis, ke ili ne estas ĉe ni, ni ne scias, sed ili certe serĉas nin kaj ne povas nin trovi. Ni tutkore petas vin: diru al Avo Frosto iri al niaj patrinoj kaj sciigi, ke ni estas tie ĉi, ke ni ilin atendas! Ni atendas ilin ĉiutage, ĉiuhore!

— Kaj kiel vi estas nomataj? — demandis la viro per tia voĉo de sincera kompatemo, kvazaŭ li volus certigi ilin, ke li nepre transdonos al Avo Frosto ilian peton.

La infanoj diris siajn nomojn, aldonante kian koloron havas la haroj de la patrinoj. La okuloj de la viro malsekiĝis kaj por kaŝi tion li diris energie:

— Jes, mi jam komprenis. Mi nepre trovos Avon Froston kaj ĉion diros al li. Vi estu trankvilaj, nutru vin bone, dormu trankvile, lernu regule viajn lecionojn por ĝojigi viajn patri-
nojn.

La viro rapide eliris. Lin sekvis la rigardoj de la du knabetoj.

Li rakontis tiun kortuŝan historion al siaj konatoj. Pasis nelonga tempo kaj en la domon por sengepatraj infanoj venis du emociiĝintaj virinoj por serĉi siajn infanojn. La infanoj montriĝis ĝuste tiuj du knabetoj, pri kiuj mi rakontis.

R. Wiener

AMO, AŬTUNO KAJ GRAFOLOGOJ

Estis eksterordinare bela aŭtuna tago, kiam la sorto min kaptis. Juna blonda virino paŝis al mi kaj demandis retene:

— Pardonu, ĉu vi scias, kie estas la Finovstrato?

Mi rigardis ŝin mallonge. Ŝi estis rave bela, simila al la legantinoj de ĉi tiuj vicoj.

— Ankaŭ mi iras tien, — mi mensogis. — Se vi volus min akompani, bonvolu!

— Tre afable, — ŝi diris kaj ek-

paŝis gracie apud mi. Ŝia irmaniero similis tiun de gazelo. Mi komencis altnivelan interparolon.

— Fariĝas aŭtuno! — mi diris, montrante per mano al la arboj.

— Jes, bedaŭrinde, — ŝi diris kaj ekrigardis min per siaj sorĉaj okuloj.

En tiu momento nia sorto estis decidita. Ni ne iris al la Finovstrato, sed en malgrandan kafejon. Tie Sabina — tiel nomiĝis la juna virino — rakontis al mi kelkajn detalojn el sia vivo. Unue ŝi fariĝis flegis-



tino, sed ne povis toleri sangon kaj pro tio ĉesis labori en tiu profesio. Poste ŝi komencis studi por bibliotekistino kaj nun laboras en fabrika biblioteko. Ŝiaj gepatroj vivas en Turingio kaj ŝi posedas meblitan ĉambron en la loĝejo de maljuna sinjorino, kun tapetoj same maljunaj kiel tiu vidvino.

Tian ĉambron oni devis vidi! Sed Sabina estis alia ol mi supozis. Ŝi petis min nepre ne viziti ŝin, ĉar viziton ŝi permesas nur al sinjoroj kun bona reputacio. Kaj pri mi ŝi ankoraŭ nenion scias.

Ŝia logiko estis konsterniga ne nur en tiu punkto. Ekzemple ŝi strikte malkonsentis fari kun mi ekskurson al la ĉirkaŭaĵo.

— Oni anticipu precize scias, kio okazus. Mankus la tiklo de la surprizo, pri kiu mi ne volas rezigni! — ŝi malcedis.

Dum la sekvantaj tagoj evidentiĝis al mi, ke ŝi estas la ĝusta edzino por la tuta vivo. Mi skribis al ŝi leteron, en kiu mi detale eksplikis la psikologian flankon de niaj interrilatoj kaj petis ŝin pri skriba respondo.

Ŝia letero estis esperige bona. Ŝi respondis al miaj sentoj kaj ŝajnis ema iri kune kun mi tra la vivo dum la sekvaj sepdek jaroj.

Sed mi estas homo, kiu volas esti certa. Jam ofte iu ajn kredis, ke li trovis la idealan edzinon, kaj poste ege pentis sian elekton. Pro tio mi portis la leteron de Sabina al fama grafologo. Li legu ŝian karakteron el

ŝia skribo. La ekspertizo de la grafologo estis frakasa. Mi devas ĝin citi laŭvorte: „La skribinto de la esplorita letero estas — laŭ la tipo de la skribo — homo neekvilibra, regata de primitivaj afektoj. Kelkaj skribtipaĵoj (strekformaj i-punktoj, plilongigo de la komencaj kaj finaj strekoj, movoplifortigo ĉe substantivoj) parolas pri forte mi-akcentitaj aŭ eĉ egoistaj animaj impulsfortoj. La neklaraj, malakurataj komoj atestas certan malsolidecon. Se oni rigardas la miksaĵon de skrib- kaj presliteroj, klare reliefigas la labila karaktero de la skribinto. Mallonge: persono, kun kiu interrilatoj ne estas rekomendindaj.“

Tiun ekspertizon mi legis sepfoje. Poste mi decidiĝis. Kun peza koro, sed sekvante la racion, mi rezignis por ĉiam. Mi faris tion skribe, ĉar mankis al mi kuraĝo ankoraŭfoje paroli kun Sabina.

Feliĉe mi baldaŭ konatiĝis kun Irena, kiu igis min rapide forgesi Sabinan. Ŝi estis virino, kiu ne kontentiĝis pri duonaĵoj. Irena eĉ ne lasis tempon al mi esplorigi ŝian skribon. Jam post du monatoj mi sekvis ŝin al la nuptejo.

Reirante ni renkontis Sabinan, kiu nin alparolis. Sed ŝi ne turnis sin al mi, sed al mia novedzino.

— Vi konas vin reciproke? — mi demandis mirigite.

— Nature, — ridis Sabina. — Irena estas mia plej bona amikino. Ŝi eĉ skribis leteron al vi. Tiam, kiam mi lezis mian manon.

El la germana: Wilfried Hofmann

Nevena Nedelčeva

LA KORO DE LA POETO

Ĉu vi scias, kio estas la koro de la poeto?

Ĝi similas al la perla mitulo. La suferoj, enirantaj ĝin, similas al sabletoj, kiuj transformiĝas en perlojn. Kaj ju pli grandaj estas la suferoj, des pli la homoj ĝuas la neordinarajn perlojn — kantojn, poemojn, rakontojn.

La homoj, kiuj ornamas sin per perloj de mituloj, ne konas la suferojn, dum kiuj ili transformas la sableton en perlon. Same kiel oni ne scias la doloron kaj la turmentojn de la poeto, kiu transformas siajn suferojn en ĝuon por la aliaj.

UNU DIMANĈO EN «MARIA MAÇADO»

Afiŝo en la ejo de la loka organizo de la komunista partio anoncas per grandaj literoj:

„GEKAMARADOJ! Proksiman dimanĉon okazos granda labortago en UCP* „Maria Maçado“ por helpi la kamparanojn rikolti tomatojn. Venu kun ni! Alportu vian manĝaĵon!”

Mi estas kortuŝita kaj decidas partopreni la septembran labordimanĉon.

Efektive je la sesa matene, kiam mi alvenas al la renkontejo en la centro de la urbeto, tie jam multe da personoj estas atendantaj transporton. Pro la malnovaj kaj uzitaj vestaĵoj ili aspektas malbele. Tamen ili kunportas sakojn, el kiuj eliras aromo de bongustaj manĝaĵoj. . .

Fine alvenas la atendataj transportiloj. Ne luksaj kaj komfortaj aŭtobusoj, sed. . . potencaj traktoroj, trenantaj ŝarĝveturilojn kun laŭlongaj benkoj.

Post unuhora veturado la traktoroj haltas antaŭ vasta tomatkampoj. Ni estas en la bestbreda kaj terkultura UCP „Maria Maçado“, unu el la tricento da UCP, naskitaj antaŭ du jaroj, kiam la revolucia registaro de Vasko Gonsalves decidis disdoni la teron al tiuj, kiuj ĝin kulturas. Same kiel en aliaj regionoj de Portugalio, ankaŭ ĉi tie la vilaĝaj proletoj okupis la vastajn bienojn de riĉaj posedantoj kaj fondis UCP. Per la nomo Maria Maçado ili volis honori la heroan virinon, kiu dum la tempo de la portugala faŝismo vigle laboradis en la sekretaj presejoj de la Portugala Komunista Partio.

Tuj post la alveno ni eklaboras. Kiel soldatoj en linia ordo, kun korpoj antaŭen fleksitaj, ni penetras en la kampon. Belaj ruĝaj tomatoj pendas de la trunkoj.

Post nelonge ni konstatas, ke la tomatrikoltado ne estas agrabla afero. La neoportuna pozicio de la trunkoj kaŭzas lumbodolorojn. Baldaŭ ankaŭ piedoj, genuoj kaj kruroj prezentas siajn plendojn. „Vere peniga estas la kampa laboro!“ — mi pensas.

Mia penso certe estas ankaŭ penso de miaj kamaradoj. Sed neniu perdas la kuraĝon. Ĉiu volas esti pli laborema ol la aliaj. La kestoj por tomatoj, metitaj sur la tero, rapide pleniĝas. De malproksime rigardataj tiuj kestoj formas centojn da ruĝaj punktoj kiel gutoj de sango. Ĉu ili ne simbolas la sangon de la kamparanoj, verŝitan en ilia jarcenta lukto por libero?

Ekpluvetas. Neniu foriras. Kun la pluveto alvenas al ni malproksimaj revoluciaj kantoj. Kio estas? Transistoraparato? La kantoj plifortiĝas. Niaj korpoj rektiĝas, kaj ni rigardas ĉirkaŭen. Tio estas grupo de novaj gekamaradoj, kiu alvenas. Ni ĉiuj respondas per kanto kaj per levitaj pugnoj.

— Vivu la agrarreformo! Vivu la solidareco kun la kamparanoj!

— Vivu PKP!

Ni estas nun pli ol ducent personoj. Viroj kaj virinoj. Junaj kaj maljunaj.

Daŭras la rikoltado, akompanata de kantoj kaj politikaj anekdotoj.

Tagmeze venas la paŭzo por manĝado. Niajn modestajn manĝaĵojn ni manĝas rapide. Ankaŭ ripozon ni faras sub la arboj.

Kaj venas la posttagmeza laboro. La ordono eksonas, kiam ni dormas:

— Gekamaradoj! Atakon al la tomatoj!

Estas la deksepa horo, kiam la laboro finiĝas. Rikoltitaj pli ol 75 000 kilogramoj!

Por fini la tagon, ĉiuj kunvenas en la sidejo de UCP. La kamparanoj estas preparintaj por ni simplan, sed bongustan lunĉon. Oni dancas. Oni

* UCP—Unuiĝo de Kolektiva Produktado.



kantas. De la supro de ŝargveturilo iu kamparano ekparolas:

— Ni estas tre dankaj al vi pro via helpo! Manifestita estas la solidareco proleta. Nenia imperiista forto povas ĝin detrui! Nenia reakcia aŭ kapitalista forto povas haltigi la marŝadon de la portugala revolucio!

Ni respondas:

— Kamaradoj! Ni plenumis nian devon, ĉar nia lukto estas la via. Kiam ni eksciis, ke vi ne havas

„manojn“ por rikolti la tomatojn, ni tuj decidis veni. La samo okazas hodiaŭ ĉie. Miloj da urbaj laboristoj eliris el siaj hejmoj por rikolti tomatojn. La estonto estas nia! Vivu nia unueco!

La suno jam malaperas post la horizonton, kiam per la slogano „Ven- ceremos!“ (Ni venkos!) ni adiaŭas unu la alian kaj revenas hejmen, lacaj kaj dolorigitaj, sed kun sento feliĉa pro la plenumita devo.

Verdaĵ steletoj

KNABINETO KAJ MALJUNA KVERKO

Vanja Filipova

En la pina parko estis kaŝita malgranda blanka domo. En ĝi vivis maljuna gardisto kun sia nepineto — frumatene leviĝanta knabineto kun violkoloraj okuloj kaj roza rubando en la haroj. Sur la kampo antaŭ la domo etendissiajn branĉojn soleca alta kverko kun cikonia nesto en la pinto.

Iun matenon la forstogardisto decidis viziti la junajn pinetojn en la malproksima rando de la arbaro. Li ĵus eliris, kiam sur la kampo haltis buso plena de laboristoj. Ili komencis mezuri la teron. Du el ili kun longa brila segilo direktiĝis al la kverko. Grandega fosmaĉino frande ekmordis la blankajn lekantojn kaj la bluajn kampanulojn kune kun la tero. La cikonioj timigite elflugis el sia nesto. Ili komencis fari cirklojn en la ĉielo kaj malsupreniĝadi al siaj idoj.

La knabineto emis jam ekplori pro doloro. Kial ŝia avo ne estas nun ĉi tie por savi la kverkon, helpi la cikoniojn? Ja li estas gardisto de la parko! Si forĵetis sian pentroblokon kaj ekkuris al la laboristoj:

— Oĉjo, kion vi faros?

— Ĉu vi el la fabeloj venis kun tiuj ĉi oraj haroj? — sincere ekridetis unu el la viroj. Li estis ĉefinĝeniero.

— Mi loĝas jen tie. . . — La knabineto montris la blankan domon kaj aldonis: — Sed vi ordonu al la labo-

ristoj ĉesigi la laboron. Mi petas vin!

— Sed ni konstruos ĉi tie ripozdomon, altan ĝis la ĉielo. Ĉu vi ne volas tion? — respondis la inĝeniero serioze, apenaŭ retenante sian rideton.

— Kaj ĉu vi forhakos la maljunan kverkon?

— Ni forhakos ĝin! Rigardu kiom multe da arboj estas sur la monto.

— Sed mi ploros pri ĝi. . . Ankaŭ mia avo ploros. . . Li diris al mi, ke la kverko havas tricent jarojn.

En la okuloj de la infano perlis du klaraj larmoj.

La inĝeniero silente levis rigardon al la supro de la arbo kaj unuafoje miris pri ĝia pompa krono. Apenaŭ nun li rimarkis ankaŭ la neston kaj la birdojn. Li koleris al si mem kaj ĉesigis la laboron. Taŭzinte la helajn harojn de la knabineto, li haste eniris la furgonon kaj longan tempon ne montris sin.

La inĝeniero staris kliniĝinte super iaj desegnaĵoj kaj streĉis la okulojn al ili, meditis. La katuna kurteno de la fenestreto tremetis de tempo al tempo pro la vento. Tra la breĉo li okulesploris la kampon kun la bela kverko, kaj lia vizaĝo fariĝis ĉiam pli kaj pli serena. Kiam la inĝeniero malfermis la pordon, li estis surprizita. La knabineto sidis sur la ŝtuparo.

— Oĉjo, vi ne forhakos la kverkon, ĉu ne?

La inĝeniero respondis nenion, prenis ŝian manon kaj ili kune ekmarŝis al la fosmaŝino. Li mem mezuris kvindek larĝajn paŝojn de la kverko kaj diris:

— La konstruaĵo komenciĝos de ĉi tie. Sur la kampo estas loko por la ripozdomo, ankaŭ por la maljuna kverko kaj por la cikonioj!

Li tenere ĉirkaŭprenis la knabine-ton, kisis ŝin kaj revenis al siaj desegnaĵoj.

La nepineto de la forstogardisto ekridis feliĉe, kuris al la malgranda domo, prenis la pentrobloketon kaj sidiĝis inter la florantaj lekantoj. Per ruĝa, flava kaj oranĝa farboj ŝi pentris grandan gajan sunon, kiu trapenetris la kverkajn branĉojn.

El la bulgara: Anastas Todorov

Distroĵ

En ĉi tiu angulo ĉiu frato gajulo rajtas sidi kaj ridi.

ĈU VI SCIAS, KE:

- La horo loĝas en horloĝejo?
- negranda ripo estas ripeto, kaj ĉiuj ripoj estas riparo?
- du komoj kune povas esti komparo?
- se iam vi verkus odon pri bestoj, la strofo rilatanta katon estus katastrofo?
- kiam oni rabas alian personon, tiu lasta estas rabato?
- ne ĉiu homo, portanta bastonon, havas basan tonon, kiel ne ĉiu posedanta balkonon havas konon pri balo?
- la cimballo ne estas agrabla balo?
- kataro kaj katarakto ne estas nur malsanoj? (Vidu pri tio katalogon!)
- litero estas ero de lito, kaj multaj literoj faras literaturon?
- ter-mino povas esti ankaŭ en la terminaro?
- te-studo estas malfacila por la testudo?

GABROVANOJ

Al la konata komercisto kaj procentisto el Gabrovo avo Minjo Popa venis gaste vilaĝano el la ĉirkaŭaĵo, lia liveranto de krudaĵoj. Vespermanĝinte ili sidiĝis sur maton kaj komencis preparoli siajn aferojn. En iu momento avo Minjo estingis la lampon dirante:

— Ne, estas senco vane uzi la petroilon. Ja sen tio ni bone aŭdas unu la alian kaj bone interkompreniĝas.

Ili parolis certan tempon. Ĉe la adiaŭo la dommastro etendis manon por bruligi la lampon.

— Momenton! — haltigis lin la gasto. — Dum ni parolis en la mallumo, mi decidis ne eluzi mian pantalonon.

Kaj li vestis sian sakpantalonon.

LA FIŜKAPTISTOJ

- Hieraŭ mi vin ne vidis sur la glacio.
- Mi kaptis fiŝojn aliloke.
- Kaj kiel estis tie?
- Ho, mia amiko! Tiel rapide la fiŝoj kaptiĝis, ke mi iufoje ne sukcesis ilin ensiteligigi.
- Mi ne kredas vin.
- Kaj kiu kredas? Se fiŝkaptistoj veron parolus, nia Tatario delonge senfiŝiĝus.

El la tataara: F. Faizova

VIZITKARTOJ

1. Sur la vizitkarto de mia amiko estas skribita ne nur lia nomo kaj loĝloko, sed ankaŭ lia profesio. Ĉu vi deziras ekscii, kio ĝi estas? Por tiu celo loku alimaniere ĉiujn literojn.

Trif. Jo ev — Sofio

2. En la nomo de mia korespondanto estas donita ankaŭ lia loĝloko — ĉefurbo. Ĉu vi povas komprni, kiu ĝi estas?

K. Somov

Demandas Petro Edrev

Solvo de la vortenigmo en n-ro 10

Horizo tal: 1. Roz. 3. Akcel. 8. Id. 9. Aero. 10. Not. 12. Ans. 13. Granda. 15. Neulo. 18. Blonda. 21. Gut. 22. Duŝ. 23. Okul. 25. Ra. 26. Kimon. 27. Vad.

Vertik l: 1. Ringo. 2. Odor. 4. Kanalo. 5. Ces. 6. Er. 7. Los. 11. Tan. 12. Adult. 14. Nebulo. 16. Ond. 17. Pasad. 19. Dura. 20. Vok. 21. Gum. 24. Ki.

Slogano: Vivu la Gra da Oktobra Revolucio!



PACKANTO

Teksto kaj muziko *Numa Droz*, (Svislando)

Ĉi- u te- ra- no es- tu ka- ma- ra- do!

Ĉi- u- ta- ge ĉi- e pos- tu- lu pa- con ni! Tuj, tuj, tuj

es- tu pa- co jam! En es- ton- ta flo- ra

sen ar- me- o, sen ar- mil' vi- vi vo- las ni! Blan-

kul' kaj ni- grul' es- tu fra- toj ni! Per Es- pe- ran- to fra-

ti- ĝi vo- las ni! For, for, for! La ar- mi- lojn for!

Ni, ni, ni, ni, ĉi- u- j ni, ĉi- u- j ni de la pa- co ĉi- e

es- tas pi- o- ni- roj pi- o- ni- roj.

deziras korespondi

Ĉiu terano estu kamarado!
 Ĉiutage ĉie postulu pacon ni!
 Tuj, tuj, tuj estu paco jam!
 En estonto flora sen armeo, sen armil'
 vivi volas ni!

Blankul' kaj nigrul' —
 estu fratoj ni!
 Per Esperanto fratiĝi volas ni!
 For, for, for, la armilojn for!
 Ni, ni, ni, ni, ĉiuj ni,
 de la paco ĉie estas pioniroj, pioniroj!

Bulgario

Grupo de poŝtistoj el u. Ruse deziras korespondi tutmonde:

Nikolaj Kavalĝiev — str. Car Asen 11, Ruse (teknikisto — pri ĉt)

Nikolinka Paŝeva — str. Fr. Engels, blok «Koznica» pl. vĥod G., Ruso (oficistino — pri ĉt)

Rumjana Kucarcva — str. Koznica pl. 28,
Ruse (fraŭlino — pri ĉt)

Ivan Slavcv — str. Rila 11, *Ruse* (oficisto — pri E-literaturo, popolkutimoj, proverboj, futbalo, amatora fiŝkaptado ka.)

Nedjalka Daskalcva — str. Silistra 6, bl. Rodina, vĥod V, *Ruse* (oficistino — pri ĉt)

Maria Ĥristova — str. Tulĉa 9, ap. 40, *Ruse* (teknikistino — pri ĉt)

Georgi Bodurcv — Zdravec, bl. 86, vĥod A *Ruse* (teknikisto — pri E-literaturo, proverboj, kutimoj, turismo)

Kalinka Genovska — str. Skob v 60, *Ruse* (oficistino — pri ĉt)

Jordanka Sâbcva — str. St. Dimitrov 22, tavana, *Ruse* (fraŭlino, teletajpistino — pri ĉt)

Ĝehoslovakio

Kare' G'eisner — V ro' li 8, CS — 293 01 *Micčá Eokslaz* (stuc'ento — pri kulturo, filozofio, voaĝaĉo, lingvoj).

GDR

Deana Irmis'h — 961 *Glauclau*, Robert-Ko h-Siedlung 27 (18-ara stuc'entino).

Heinz Heimann — 9284 *Marbach*, Lorenzstrasse 19 f (48-jara instruisto).

Ursula Stopp — 9373 *Ehrenfriedersdorf*, Feldstrasse 6 (49-ara instruistino).

Stefan Weber — 90 *Karl-Marx-Stadt*, Schlessberg 11 (33-ara varbogr fikisto).

Rolf Wendler — 90 *Karl-Marx-Stadt*, Par-sevalstrasse 8 (42-jara apotekisto).

Brigitte Stingl — 90 *Karl-Marx-Stadt*, Rudolf-H rlass-Str. 19 (49-ara apotekistino).

D-ro Klaus Schulze — 95 *Zwickau*, Karl-Keil-Str. 15 (36-ara fakturacisto por pediatrio).

Ilona Unger — 943 *Schwarzenberg*, Bermsgrünerstr. 5 (17-ara lernantino).

Pollando

Beata Kra'czyĉ, 47-262 *Denbowa 1*, woj. O'p'o'le (foto, medicino, turismo).

Danuta Smoliĉ, 74-410 *Mieszkowice*, ul. Morynska 7 (22-ara — muziko, libroj).

Elzbieta Kasprzaĉ, 05-490 *pocz. Sobienie-Jeziory*, Pizonin 28, woj. Siedleckie (16-ara — muziko, filmo, Esperanto).

Ewa Wyrobeĉ, 43-134 *Kosztowy*, ul. Bro-niewskiego 14 (lernantino — literaturo, historio, geografio).

Jaĉwiga Char-zyńska, 49-330 *Losiow*, ul. Stawowa 5 (23-ara — muziko, teatro, literaturo, bk, pm, gramofondisko).

Jolanta S hme'ling, 59-520 *Chojnow*, str. Krasi'kiego 6 m 4 (23-jara — muziko, turismo, reiproka gastdo).

Ma'gorzata Botner 22-300 *Krasnystaw*, str. Okrzei 24-a bl. 3/7 (16-jara — muziko, bk.)

Sovetunio

Dautova Gjuzel — 453210, *Iŝimbaj*, str. Sov'e'skaja 60/12 kv. 5, Baŝkirio (21-jara — kun ĉl pri ĉt).

Vla'dimir A. Aleksandrov — 245110 *Ŝostka*, Sumskaja cbl., K. Marks 101 (kun ĉl — precipe filatelo, E-movaĉo).

Anatolio Taratenko — 340011 *Doneck*, Institut kaja 10—11 (22-jara laboristo).

Birjukov Vasi'ij — ul. Volgograds'kaja 121, kv. 13, 625025 *Tjumen* 25 (23-jara inĝeniero — kun ĉl pri ĉt, bk, insignoj ka.).

Ĥ Vaiĉiu'lin'ite Irena — Talaĉkoniai km. «Istra», 235250 *Pasvalys*, Litovio (14-jara lernantino).

Svedio

Sigurd Ekendhal, Stöd'cgränn, 703—45 *Örebro* (kun bulgaraj esperantistoj).

Se vi deziras havi svedajn leteramikojn, skribu al la suba adreso de ĵurnalo, indikante vian aĝon, profesion, temojn, adreson kaj nepre menciui, ke vi deziras korespondi en Esperanto: „Vem Vill Skriva Till?“, ins. Red. „Expressen“, 10516 *Sto kholm*, Svedio.



La 14-an de oktobro post longa kaj turmenta malsanado forpasis

Dotinka Ilieva Conkovska

edzino de nia E-aktivulo Minko Conkovski el Sofio. Ŝi de junaĝo partoprenis aktive la kontraŭfaŝistan batalon kaj multe helpis la agadon de la Bulgara Laborista E-Asocio.

Niajn kondolencojn al la funebranta familio!

